

## Kial necesas krei indicon pri lingva justeco

Herodoto kaj aliaj antikvaj grekoj dividis la homaron inter la scipovantoj de la greka kaj la aliaj - la barbaroj. Miloj da jaroj poste, lingvaj politikoj aplikitaj en multaj landoj ankoraŭ daŭrigas la saman ideon. En ĉi tiu mallonga teksto mi argumentos, ke por promocii pacon oni nepre devas redukti la diskriminaĵojn inter etno-lingvaj grupoj. Tiucele, nova ilo por taksii la gradon de lingva justeco en socio, havigante sisteme kaj rigore informojn, povus utili por proponi lingvan politikon, kiu mildigos konfliktojn en multkultura mondo.

Fakuloj pri internaciaj rilatoj, politika scienco aŭ esplorado por paco ne ĉiam konscias pri fundamenta soci-lingva realaĵo: En la mondo estas 6000 lingvoj, sed nur 193 ŝtatoj. Sekve, foje limoj ŝtataj kaj lingvaj koincidas - sed tio estas escepto. Krome, ni scias, ke lingvo estas grava parto de identeco. Se ni rilatigas ambaŭ aferojn, ni komprenos pli bone, kial problemoj pri identeco kernas la plimulton de perfortaj konfliktoj en la lastaj 70 jaroj.<sup>1</sup>

Ni ankaŭ scias, ke multaj el la hodiaŭaj armaj konfliktoj ne estas inter ŝtatoj, sed enlandaj. Ofte, etnaj minoritatoj plendas kaj pledas por kolektivaj rajtoj al la centra registaro. La registaro, kontraste kun kio okazas en aliaj dimensioj de identeco - kiel religio -, ne povas esti neŭtrala pri lingvo: La ŝtato devas nepre havi lingvo-politikon, tio estas: lingvo, en kiu la leĝoj estas proklamitaj; lingvo por interagi kun la civitanoj; lingvo por realigi publikan instruadon, ktp. La neeblo de liberala neŭtraleco rilate al lingvo signifas, ke neniam la registaro povas eviti preni flankon, kvankam implicite. Tiele, lingvo-politikoj, kiuj ne adekvate mastrumadas diversecon generos diskriminadon, preparante la grundon por estontaj konfliktoj.

La graveco de tiu ideo videblas en Eŭropa Unio. Oni devas memori, ke la unua normo aprobita de la Eŭropa Konsilio en la tempo de *Schuman* kaj *Monnet* temis pri lingvo-politiko. Laŭ tiu normo, la kvar oficialaj lingvoj de la ŝtatoj (franca, germana, itala kaj nederlanda) estis oficialaj en EU. Teorie, la sama politiko daŭras hodiaŭ, sed kun 24 oficialaj lingvoj. La praktiko donis superecon al la franca, al la germana kaj ĉefe al la angla. Tamen, multaj homoj en EU ne scipovas la anglan; ĉefe, la plej malriĉaj, oldaj kaj malpli edukitaj. En kelkaj landoj, nur 20% scipovas iom la anglan. Sekve, kiam EU faras projektojn nur en la angla, tio kreas lingvan maljustecon.<sup>2</sup>

En aliaj kunteksto, lingvaj maljustaĵoj estas ligitaj al la eko de arma konflikto aŭ milito. Ekzemplo estas la origino de la Internacia Tago de la Denaska Lingvo, kiun la Unesko solenas ĉiun 22an de februaro. Mallonge, kiam

---

<sup>1</sup> Vidu, ekzemple, la studojn de la datumbazo de konfliktoj Plimulto je Risko (angle *Minorities at Risk*), kreita de Ted Robert Gurr, Universitato de Marilando <http://www.cidcm.umd.edu/mar>.

<sup>2</sup> La esplorado de Michele Gazzola kaj François Grin, inter aliaj, enhavas rigorajn kaj nekontesteblajn datumojn pri ĉi tiu temo. Multaj de iliaj publikigadoj haveblas en la retejo de la Universitato de Genevo, Instituto pri Ekonomio, Lingvoj kaj Edukado.

Pakistano sendependiĝis de Barato, ĝi elektis oficialan lingvon: la urduan. Tamen estis komunumo de homoj, kiuj ne scipovis la urduan, sed la bengalan. Ili do sentis sin diskriminitaj. Granda manifestacio kontraŭ la lingvo-politiko de Pakistano estis la 21an de februaro 1952 kaj la registaro forte subpremis ĝin. Sekve ekis sendependiĝa movado, kiu finiĝis en la kreado de nova ŝtato: Bangladeŝo.

Dume, en la lukto kontraŭ la sudafrika apartismo turno-punkto estis la ribelo de Soweto (1976). Tiu ribelo estis ligita al la studenta manifestacio kontraŭ la lingvo-politiko de la sudafrika registaro post la *Afrikaans Medium Decret* de 1974, kiu devigis la afrikansan kiel lernolingvo en duagrada lernejoj. La registaro forte subpremis ĝin, kaj sekvis la ekribelo de Soweto. Aliflanke, en Tajlando estas Islama malplimulto, kiu scipovas la malajzian lingvon, kaj Budhista plimulto, kiu scipovas la tajlandan lingvon. Tie, oni dokumentis multnombrajn kazojn de ŝtataj lernejoj bruligitaj kaj ankaŭ instruistoj murditaj. Pli ol religio, la afero ŝajnas rilati al la fakto, ke en la sudo de la lando, 80% scipovas la malajzian, sed la tajlanda estas la lingvo de edukado kaj de soci-politikaj ŝancoj.<sup>3</sup>

Oni retrovas trajtojn de la bengala movado ankaŭ en Sri-Lanko, kie la tamila-parolanta malplimulto reagis simile al la lingvo-preferoj de la ŝtato. Tiele, en 1948 la unua registaro de la sendependa Sri-Lanko elektis la sinhalan kiel oficialan lingvon de la ŝtato (komence, ankaŭ la anglan). Tuje, la minoritato, kiu parolas la tamilan estis diskriminita kaj ekskludita el publikaj laboroj. En ĉiuj tiuj kazoj – Bangladeŝo, Sudafriko, Srilanko kaj Tajlando – la sama procezo okazis: Malbona mastrumado de lingva diverseco kreis situaciojn de maljusteco. Kvankam ne kiel sola kaŭzo de konflikto, tia maljustaĵo estis parto (en kelkaj kazoj la ĉefa parto) de pli granda aro de kultura, religia aŭ rasisma diskriminado, kiu faciligis la komencon de perforta konflikto.<sup>4</sup>

Tamen, kiel diras la saĝuloj, pli bonas antaŭzorgi ol kuraci. Alivorte, neperforta solvo de konflikto ĉiam pli malfacilas ol preventado. Ĉar la ŝtato ne povas ne agi pri la lingva afero, kaj ĉar ĉiu lingvo-politiko rezultigas soci-ekonomiajn efektojn – tio estas, ĝi kreas gajnantojn kaj perdantojn –, mildigo de lingvaj maljustaĵoj evitus ekperforton. Ekzemple, oni povus eventuale kompensi la diskriminatojn pro lingva politiko. Sed neniu agis en Ukrainio, en

---

3 Ĉi tiuj kvar ekzemploj troveblas pli amplekse en la ĉapitro verkita de Fernand de Varennes en la kolektiva libro "Mastrumado de lingva diverseco kaj pacprocesoj" (katalune *La gestió de la diversitat lingüística i els processos de pau*. 2010. Linguapax/Centro UNESCO de Katalunio.

4 De Varennes (vidu piednoton 3) mencias aliajn kazojn, kiel la kurdajn minoritatojn en Turkio kaj en Irako, la albanojn en Makedonio, la abĥazojn en Kartvelio, la moroj en Filipinoj, la transdnistrianojn en Moldavio, la nagorno-karabahanojn en Azerbajĝano, la ne-arabparolantojn en Suda Sudano, la arabparolantojn en Irano, kaj multegaj aliaj ekzemploj en Barato, Indonezio, Ĉinio, Burma..., al kiuj ni povus aldoni multajn plu.

Balkanio aŭ aliloke, kie etnolingva streĉo ebligis la ekon de perfortaj konfliktoj. Kial?

Almenaŭ parto de la respondo al ĉi tiuj demandoj ŝajnas kuŝi en la manko de indico por taksu la nivelojn de lingva justeco en la diversaj socioj kaj komunumoj. Havi indikilojn permesus nin kompari objekte, sisteme kaj rigore la efikojn de lingvaj politikoj, ekzemple tiujn de lingvo-malpermeso. Tial oni povus preni decidojn pri publikaj politikaj agadoj, ekzemple, ke perdantoj estus kompensitaj. Aldone, oni povus detekti la plej gravajn maljustaĵojn kaj agi en la prevento-fazo de identecaj konfliktoj, kiuj estas, kiel menciite, la plimulto de la nuntempaj perfortaj konfliktoj.

Resume, por atingi lingvan justecon oni devas solvi situaciojn de diskriminado. Aliflanke, krei indicon ne estas nova ideo. Estas aliaj utilaj indikiloj por klasifi landojn (pri demokratio, disvolviĝo, koruptado, paco...). Sammaniere, ilo povus konstruiĝi por gvidi nin en la realigado de politikoj, kiuj mastrumados bone diversecon. Kiel elemento de konfliktsolvado ĝia pova efiko estus grandega kaj preterirus la tiel nomatajn 'lingvaj rajtojn'. Ekzemple, en intertraktado de pacprocezo, oni povus analizi el ĉi tiu perspektivo ĉiuj ebloj pri aŭtonomeco rilatantaj al la kontrolo de la povo de la malplimulto kaj al la estonta lingvo de instruado, administrado kaj soci-ekonomiaj ŝancoj. Verŝajne, la grado de paco fine atingita dependos de la nivelo de lingva justeco de la politikoj, kiujn generos la traktato adoptita.